- Li kiel instruisto en la vilaĝoj de Azarbajĝano (turk-loĝantara parto de Irano, nord-okcidente de la lando) ektrovis ke maljusta instrusistemo regas super la lando kaj skribis siajn eltrovaĵojn en la libro ***"Esplorado en la edukadaj problemoj de Irano"*** (Kand-o kavi dar masael-e tarbiatije Iran). En la libro, kiu ankoraŭ estas valida kaj ĝisdata, li priskibas kiom estas strange kaj maljuste lernigi perslingve al infanoj kies gepatra kaj hejma lingvo estas azara kaj instrui al vilaĝaj malriĉaj infanoj laŭ instrulibroj kiuj plenplenas de luksaĵoj, kiujn la infanoj neniam vidis kaj neniel trovos en sia ĉirkaŭaĵo. La vidpunktoj de Samad estis tre modernaj kaj demokratiemaj tiu-rilate kaj ĝuste pro tio li okupiĝis verki ***"Alfabeto por Azarbajĝanaj infanoj"*** sed subite pro multaj kialoj li decidis neniigi sian verkon kaj rezignis kunlaboron kun la ŝtataj instancoj pro politikaj kialoj. Li havis sincerajn rilatojn kun siaj gelernantoj kiuj ne vokis lin "sinjoro instruito" sed simple "onklo Samad" kaj tio montras per si mem kiom sinceran kaj korproksiman rilaton kun siaj gelernantoj li havis. Li dum tiu tempo malkovris ke seka rialto kun la gelernantoj ne havas efikan rezulton. Tiam eĉ en la ĉefurbo la instrusistemo estis ege oficiala kaj seka, sed kiel pioniro Samad laŭ sia agmaniero instruis al aliaj kiel aperi en la lernejo por instruado al infanoj.

Kiel Azarbajĝanano li estis konscia

defendanto de patrina lingvo kaj laŭ li ĉiuj havis rajton ellerni sian patrinan lingvon. Lia agmaniero ne plaĉis al la tiama registaro kiu nur rekonis persan lingvon kiel komunan lingvon por ĉiuj irananoj. La reĝa sistemo nur rekonis la persan kaj neniel permesis onin lerni sian gepatran lingvon, t.e. kurdoj lerni kurdan lingvon kaj Azaroj lerni Azarbajĝanan ktp. La agmaniero de Samad estis pure kultura kaj pacema. Li ne faris bruadon sed komencis demandojn bazajn kaj oni ne kapablis limigi lin kaj lian agmanieron. Multaj intelektuloj kaj verkistoj subtenis lin kaj lian agmanieron. Sekve, li estis sukcesa je sia decidita celo antaŭenigi demandojn pri la rajto lerni patrinan lingvon.

Esplorante oni konstatas ke Samad Behrangi estas la plej konscia kaj aktiva defendanto de "la rajto pri patrina lingvo" en Irano. Li ne agis kiel ŝovinisto kaj fanatikulo nur gajni rajton por turkoj sed lia laborkampo kovris la tutan landon en kiu loĝas multaj alilingvanoj krom la persoj. Li ja aprobis persan lingvon kiel la nacian kaj forte defendis samtempe la rajton de minoritatoj. De li levitaj demandoj ankoraŭ ne estas responditaj kaj daŭre aktualas.

Lia influo sur infana literaturo en Irano ne estas forgesebla. Jen listo de libroj kiujn li verkis por infanoj:

Ulduz kaj korvoj
Kuroqli kaj kalva Hamze
Ulduz kaj la parolanta pupo
24 horojn en dormado kaj vekado
Unu persiko, mil persikoj
Talĥun
La nigra fiŝeto
La fabelo de amo
La kalva kolombisto
Rakonto de durkapulo Domrol
Kuirbet-vendista knabeto
Rakontaro de Behrangi

Pri Samad, lia vivo kaj agado jam aperis multaj libroj kaj artikoloj en diversaj lingvoj, ĉefe en la persa kaj la turka. Liaj libroj ĝis nun tradukiĝis en diversajn lingvojn.

Lia ĉefverko "La nigra fiŝeto" estas jam tradukita de f-ino M. Fahmi, eldonistoj estas bonvenaj por ties aperigo.

***Mia frato Samad Behrangi**, *Priskribo de lia vivo kaj forpaso*, Asad Behrangi, paĝo sep, Tabrizo: Nasr Behrangi, 2000 (dua preso).
La Nigra fiŝeto, Samad Behrangi, Desegnis: Farsid Mesgali, Tehrano:
Kanun-e Parvares-e Fekri-e Kudakan va Noŭgavanan, 1973 (7-a eld.)
Samad Behrangi kaj saĝa fiŝeto nigra, Sirus Tahbaz, Tehrano: Farzan Ruz, 2001.

Parteto de "La nigra fiŝeto"

...

La nigra eta fiŝo multe ŝatis la lunon. La noktojn, dum kiam la luno faladis en la akvon, ĝi deziregis supren-grimpi de sub la muskoj kaj paroli kelkvorte kun la luno, sed ĉiufoje ekvekiĝis la patrino kaj trenis ĝin sub la muskon kaj dormigis ĝin denove.

La nigra eta fiŝo antaŭen-iris al la luno kaj diris: "Saluton, mia bela lunjo!"

Luno diris: "Saluton, kara etja nigra fiŝo! ĉu vi, ĉi-tie!? Kion vi faras ĉi-tie!?"

La fiŝo diris: "Mi mond-vojaĝadas."

La luno diris: "La mondo estas treege granda, vi ne povas vagadi tra la tuta mondo."

La fiŝo diris: "Ne gravas, mi ius ĝis kie mi povus."



Far f-ino Jaĥŝi Habibpur

La luno diris: "Mi ŝatus resti ĉe vi ĝis-matene, sed, iu granda nubo estas venanta antaŭ min por malhelpi mian lumon."

La fiŝo diris: "Bela mia luno! Mi amas vian lumon, kaj ŝatas, ke ĝi briladu sur min por ĉiam."

La luno diris: "Kara fiŝo! Fakte mi mem ne havas lumon, la suno donas lumon al mi, kaj mi reflektigas ĝin sur-teren. En la lastaj jaroj ĉu vi jam aŭdis, ke la homoj intencas alflugi, kaj sidi sur min?"

La fiŝo diris: "Tio tute ne eblas."

Luno diris: "Estas malfacila laboro, sed la homoj kion ajn deziras..." La luno ne povis fini sian vorton. La nubo nigra alvenis kaj kovris ĝian vizaĝon kaj la nokto denove mallumiĝis kaj la nigra fiŝo restis tut-sola. Kelkminute ĝi rigardis la mallumon, kaj poste rampis sub ŝtonon kaj dormis.

...

Pri Samad de Lia Frato Asad

De: Asad Behrangi
Tradukis: Fariba N.Maĝd

La plejvendata verko de Samad Behrangi por infanoj - kiun bonvenigis ankaŭ sennombraj plenaĝuloj - t.e. La Nigra Fiŝeto, *jam presiĝis diversforme en variaj eldonoj. Enu el tiaj eldonoj datita je aŭtuno 1998, far Behrangi-eldonejo en Tabriz-urbo, naskiĝurbo de Samad, ĝuas antaŭparolon far lia frato, Asad Behrangi. Jene venas traduko de partoj el ĝi. Pli poste, Asad verkis amplekan libron pri Samad nomata* **Mia Frato Samad Behrangi.**

Samad Behrangi naskiĝis somere de 1939, en sudo de Tabriz-urbo en kvartalo Ĉarandab. Ezzat estis la nomo de lia patro, kiu estis laboristo kaj la nomo de lia patrino estis Sara. Ŝi krom dommastrumado, de tempo al tempo ankaŭ helpis al enspezado de la familio. Ili havis 3 filojn kaj 3 filinojn.

En tia malfacila situacio, Samad bone lernis en lernejo kaj dum noktoj nedormis ĝis malfrue kaj sub lumeto de meĉlampo legis kaj legadis. Li kiam finis la gimnazion eniris al tiama elementa instruista instituto kie oni edukis instruistojn. Tiam la instituto havis sekan kaj malbonan etoson kaj Samad tie ne restis silenta, li ĉiam kritikis kontraŭ tia etoso. Ankaŭ kun kelkaj siaj samopiniaj amikoj en la instituto, li publikigis muran ĵurnalon, kiu nomiĝis « Rido ».

Post fino de la studado, Samad ekinstruis en vilaĝaj lernejoj. Li per instruado volis helpi la infanojn, tial li serioze kaj interese instruis kaj konatigis ilin kun la vivo, libro kaj tiama atmosfero. Multajn noktojn li iris al hejmoj de siaj lernatoj kaj amikiĝis kun iliaj parencoj kaj lernigis eĉ ilin, legi kaj skribi.

Kiam li instruis en lernejo, li samtempe studis pri la angla literaturo ĉe Tabriz-Universitato. Tiel li kaj lernis kaj lernigis.

Ekirinte al lernejo, li konstatis mankojn kaj troigojn rilate al tiamaj lernejoj kaj



"Mia frato Samad" libro kiun skribis kaj redaktis s-ro Asad pri sia frato. La libro estas la plej kompleta kaj dokumentenhava pri la vivo,

verkis artikolojn esplorante pri edukaj problemoj en Irano ; li ankaŭ ekskribis rakontojn por infanoj.

La rakontoj tre plaĉis al infanoj, pro tio Samad skribis pli por infanoj; tuto de tiaj verkoj estas kolektitaj en libro «Rakontoj de Behrangi».

Talĥun estas unu el liaj rakontoj en kiu li uzis popolan fabelon de Azarbajeĝano.

Samad ankaŭ havis aliajn kulturajn kaj sociajn aktivadojn. Li skribis kelkajn artikolojn en valoraj gazetoj kaj ĵurnaloj. Samad kiel ĉiu homo amis sian patrinan lingvon kaj de infanaĝo alkutimiĝis kun fabeloj, rakontoj ... kiujn li aŭdis de sia patrino. Do li klopodis ade kolekti folkloran literaturon de Azarbajĝano kaj finfine publikigis ilin.

Samad dum sia mallonga vivo ne nur verkis, sed kune kun aliaj kuraĝaj homoj bataladis kontraŭ premantoj.

Lia fama rakonto estas «La Nigra Fiŝeto». Ĝi pro belaj desegnaĵoj (far Farŝid Mesgali) gajnis 2 honorajn medalojn de internaciaj ekspozicioj.

Samad somere de 1968 j. kaptiĝis per la morto droninte en Araz-riveron.

Bach kaj Behrangi, Blanka Birdego kaj Nigra Fiŝeto!

Verkis: Ahmad Reza Mamduhi

Bach fascinis la mondon per sia verko Ĝanatan Livingston Mevo, kaj Behrangi allogis Iranon per La Nigra Fiŝeto: kio estas sama aŭ simila inter ili kaj kio ne? Kial? Funde de tiuj ĉi du plej venditaj fabeloj modernaj, oni povas rimarki diferencojn inter kulturoj kaj socioj okcidenta kaj orienta – certe nek la politiko estis senefika!

Enkonduko


Kio furorigas verkon aŭ verkiston? Ĉu ekzistas certaj faktoroj kaj reguloj? Se jes, ĉu ili samas en oriento kaj okcidento, en nacia kaj internacia skaloj? Probable la ĉefverkoj de usona Richard Bach (elp. Riĉard Baĥ) kaj irana Samad Behrangi, t.e. respektive **Ĝanatan Livingston Mevo** kaj **La Nigra Fiŝeto** estas taŭgaj ekzemploj por tia komparado. La rezulto povas kontribui al ekkonado de tiaj faktoroj kaj reguloj kaj ilia validoskalo.

Bach, nun 68-jara, ankoraŭ flugemas soren en la ĉielon per siaj du aviadiloj kaj eĉ transen, dum, Behrangi dron(iĝ)is en riveron longe antaŭe 29-jaraĝe! Certe kondiĉaro de iliaj socioj kaj landoj rolis grave en ilia vivkvalito kaj sekve iliaj verkoj, tamen ĉu ies landsistemo rolis ankaŭ por aŭ/kaj kontraŭ alies verkanto? Kiu, kiel?

La Birdego

Richard Bach (1936-) estas usona piloto kaj verkisto kaj unu el pranepoj de fama komponisto germana J.S. Bach (1685-1750). Li verkis sian ĉefverkon, Ĝanatan Livingston Mevo en 1973. La atmosfero de la malvarma milito neniel senteblas en lia verko. Tiel povis okazi, eble ĉar ene de Usono mem – unu flanko de la milito - por plejmultaj civitanoj la milito ne senteblis. Verŝajne la vivado koloris tie por krei tian transcendan verkon, kia Ĝanatan. Fakte la mensa skalo de la verko ŝajnas multe pli alta ol situacioj materialaj kiel politiko kaj malvarma milito (tamen, kiel ni vidos la milito malbonefikegis forjn landojn kiel iranon).

Vivanta en libera kaj malferma socio, kiel Usono, Bach probable aŭtomate elektis sian ĉefheroon birdon, kio povas facile asocciiĝi kun libereco kaj komforto. Kaj inter la birdoj, li elektis mevon, kiu relative estas granda kaj forta birdo kun malmultaj plifortaj malamikoj. Kaj fine la mevoj pleje blankas kaj blanko pli koincidas kun espero, sereneco kaj ĝojo. Ĝanatan, la mevo, estas maturiĝanta birdo kaj per siaj demandadoj radikaj enuigas la maljunajn mevojn, kiujn la ĉiutageco kaj rutino forte kaptintas. Ĝi ĉiam deziras flugi pli kaj pli supren, pli kaj pli



Far s-ro Muses

rapide. Ĝanatan sopiras novajn horizontojn kaj por atingi ilin, havas pli ol sufiĉan persiston kaj insiston.

Bach libere skribis en sia patrina lingvo, la angla, kio eĉ sen traduko povus disvastiĝi tra la monda.



La Fiŝeto

Samad Behrangi (1939-1968) estis irana turko kiu instruis en elementaj lernejoj pleje en vilaĝoj de Azarbaiĝano kaj verkis sian ĉefverkon, La Nigra Fiŝeto, en 1968, lasta jaro de sia mallonga 29-jara vivo, kio finiĝis per lia drono – aŭ laŭ iuj droniĝo – en riveron Arazo. La fermiteco de lia medio ĉu la politika ĉu la socia, evidente traviveblas en la verko. Probable la plejmulto de la plenkreskulaj legantoj de la libro interesiĝis pro la soci-politika interpretado de la historieto.

Eventuale Behrangi konscie-nekonscie elektis sian heroon sub la efiko de la fermita socio: fiŝo ĉiam kaptitas en la fermiteco de la akvo. Eta fiŝo estas eĉ pli malforta, neglektebla kaj katenita, kaj nigra koloro pleje signifas funebron, malesperon kaj malfeliĉon, almenaŭ en irana kunteksto.

Dum lia mallonga vivo, Irano pasigis socipolitikajn ŝanĝojn kaj ties postsekvojn plejparte trudita al ĝi de ekstero: la dua mondmilito kaŭzis okupiĝon de la lando, ŝanĝiĝon de la registaro, ... kio pli poste kondukis al interveno de Usono kaj Britujo en naciajn aferojn de Irano i.a. renversigo de treege populara registaro naciama de d-ro Mohammad Mosaddeg (1882-1967) en aŭgusto de 1953. Multaj kredas ke se lian ŝtaton Usono kaj Britujo ne faligus, Irano ĝuus multe pli bonajn statojn ekonomie, socie kaj politike. Laŭ teorio, la tria-mondaj landoj restas tria-mondaj ĉefe ĉar kiam ajn populara reĝimo aŭ ŝtatisto ekprogresigas la landon, la superpovoj de la tempo rekte aŭ nerekte faligas ilin. En Irano Mirza Tagi-ĥan AmirKabir meze de 19-a jc estas alia ekzemplo ĉirilate, kiu dum Gaĝarida dinastio (1794-1925 p.K.) estis ĉefministro. Ni memoru ke ankaŭ Japanion ekprogresigis pleje naciamaj gvidantoj post la dua mondmilito. Mosaddeg certe estis tia ŝtatisto, ĉar i.a. li penadis por naciigo de la irana petrolo for de la brita hegemonio, brile defendinte pri tio ĉe la Internacia Kortumo de Hago.

La eksterlandaj intervenoj estigis malluman etoson super la lando: kio kaŭzis malliberon, malesperiĝon, cenzuron, ... al la lando, landanoj kaj ties pensemuloj kaj verkistoj, kiel Samad, kaj multaj aliaj, el kiuj Sedeg Hedajat (1903-1951), estante "La plej influa persa prozverkisto de post Sadio (ĉ.1215-ĉ.1290)" (Hillmann 1990) i.a. sinmortigis.

Tio estus nigra rezultigado ke verŝajne sen subpremado kaj malfeliĉigo de regiono, kiel tiama Irano, alia regno, kiel Usono tiama, ne povas esti kaj resti libera kaj feliĉa! Ĝangala leĝo ĉe la maro: mevoj vole-nevole, konscie-nekonscie nutras sin per fiŝetoj.

Rilate al libereco, ekz-e, Samad kaj multaj aliaj verkantoj – kaj verkuntoj – de Irano deziris skribi en sia patrina lingvo, tamen ili ne estis permasataj tion fari! Samad certe regis la turkan lingvon pli bone ol la persan - tamen li ne estis permesata verki en ĝi. Li povis publikigi nenion en la turka! Do li devis ellerni alian lingvon, t.e. la persan, kiu estis permesata por verkado, sed ankoraŭ ne por ĉia verkado: ekzistis ankaŭ cenzuro. Krome, kiom vaste liaj verkoj disvastiĝus eĉ en la persa? Ĉu translima sukceso eblus? Sen translingviĝo? Kiu povus traduki majstre la verkon? Ĉu li



36 jara Bach

devus elleni trian lingvon? Tion fakte li provis studante la anglan, tamen tia lernado certe ne povus fruktodoni kiel estis pri la persa. La persan li povis ĉie praktiki; kio ne estis ebla rilate al la angla.

Skalo de Sukceso

Certe skalon de sukceso ĉe beletraj verkoj, difinas la skalo de ilia lingvo: ju pli vasta kaj multnombra la regnaro de lingvo kaj ties parolantoj geografie kaj demografie, des pli multa ŝanco por akceptiĝo kaj sukceso rilate al la libro.

Kiel konate, Rumio (1207-1273) nun estas plejvendata poeto i.a. en Usono. Tamen aliaj persaj poetoj, kiel ŝejko F. Attar (1119-1229?) - kiun i.a. Rumio mem konsideris pli alta ol si – ne estas tiel konataj eksterlande. Kial? Tre simple: hazarde. Studento angla estis donita flanke de sia profesoro libron pri Rumio. La studento estis Reynold A. Nicholson, elp. Rejnold A. Nikolson (1868-1945), kiu interesiĝinte en Rumion multege verkis pri li, tradukis liajn poemon en la anglan kaj publikigis ankaŭ detalajn interpretadojn pri Rumiaj verkoj. Sekve, eble, simile al Rumi kaj Attar, okazis pri Bach kaj Behrangi. Alivorte la lingvo de iliaj verkoj difinis ilian sukces-nivelon.

Ankaŭ rigardeto al gajnintoj de Nobelpremio precipe pri literaturo en la mondo bone montras ke la plejmulton konsistigas verkistoj kiuj aŭ rekte skribis angle aŭ iliaj verkoj, estis hazarde, tradukitaj anglen! Ĝuste kiel tiuj de Rumio.

Certe unu el gravaj roloj de vere internacia lingvo neŭtrala, kiel Esperanto, estas forigi tiajn evidentajn diskriminaciojn kulturajn tra la mondo. Espereble post la venko de Esperanto aŭtoroj kun diversaj patrin-lingvoj – kion ili ja ne elektis – rivalos sur egala kaj neŭtrala fundamento.

Estos ideale ke ĉiuj verkoj aŭ kreiĝos en sama lingvo, Esperanto, aŭ tradukiĝos rekte de la originala lingvo al Esperanto per la aŭtoro mem aŭ ties samlingvano. Vere sciindos la rezultoj de tia egalbaza rivalado beletra-kultura, kio certe havos plibonigajn efektojn por ĉiuj rivalontoj.

FONTOJ:

BACH, Richard, Jonathan Livingston Seagull (Ĝanatan Livingston Mevo), Fotoj far Russell Munson, Novjorko: Avon Books, 1973, 127 p.
BEHRANGI, Samad, Mahije Sijahe Kuĉulu (La Nigra Fiŝeto), Tehrano: Kanune Parvarŝe Fekrije Kudakan va Noŭgavanan, 1968.
HILLMANN, Michael. An Autobiographical Voice: Forugh Farrokhzad, Editor Afsaneh Najmabadi, Harvard University Press Cambridge, Massachusetts, 1990. Citita en: www.forughfarrokhzad.org/papers/papers2.htm.

Libro Prezento

Kiel diri...?

Praktika Esperanta frazeologio. Lentaigne. Laroque, 1983, 148p. 21cm. Kvinmilvorta laŭtema frazaro.

Ĉu vi ankaŭ spertis la embarason kiam vi volas esprimi opinion ne trovante la ĝustan vorton? En tiuj ĉi okazoj tre utilas preni libron kiu donas ĉiujn priskribajn vortojn grupigitaj laŭteme. "Kiel diri..." estas tia praktika Esperanto frazeologia libro kun 5000 esprimoj. La libron kompilis Lentaigne en Francio. La celo de la libro estas esence helpi uzantojn atingi fluan parolkapablon. Kvankam la libro aspektas iom malmoderna kaj nealloga, sed oni povas simple kaj rapide trovi la bezonatan esprimon pere de listo de 67 "ideoj" arbitre elektitaj, aŭ serĉante la kapvorton en enhav-listo fine de la libro.

Tralegante la libron, mi klopodis uzi ĝin por priskribi ĝin mem, kaj utiligi la okazon por montri kiel enhave aspektas la libro. Do, serĉante la parton "Libro-legi", mi elektis jenajn esprimojn por priskribi "Kiel diri..."-on: Stilo klara, glata, natura, lapidara, flua, rigida, familiara, telegrafa, konciza, lakona, pompa, instrua, konsulta kaj refrenca ...

Ĝenerale, la libro estas konsultinda kaj posedinda por referenci de tempo al tempo kiam oni sentas bezonon por pli klaraj kaj pli detalaj esprimoj.



Aleksandro en Ĉinio

Farid-od-din Attar Niŝaburi

Oni rakontas, ke Aeksandro, la famekonata konkeranto, ne sentis sin eĉ momenton trankvila, ĉiam pensante trudi la trupojn al aliaj landoj. Iam li trapasis Ĉinion. Li kun siaj akompanantoj kaj rajdantaro iris al palaco de la ĉina reĝo por pasigi kelkajn tagojn.

La ĉina reĝo farante unikan renkonton, aranĝis por ili festegon reĝecan kaj ordonis al kantistoj ludi kaj amuzi la gastojn. Post la ludado kaj espektakloj kuriozaj la ĉina reĝo anocis ke la manĝaĵo pretas.

Aleksandro sidis ĉe la manĝotuko sternita kaj mire ĵetis rigardon al la ĉina reĝo. La ĉina reĝo aludante al la boŭloj metitaj sur la manĝotuko, laŭ grandulaj tradicioj komplimentis lin, ke unue li prenu la manĝon.

Aleksandro kies miro ĉiu-momente estis pliiĝinta, ĵetis rigardon al la boŭloj kaj suprentiris la brovojn. En ĉiuj boŭloj kaj pladoj, anstataŭ la manĝaĵoj estis verŝitaj oro, gemoj, moneroj oraj kaj arĝentaj. Li diris al ĉina reĝo: "Kion mi manĝu? en tiuj ĉi boŭloj ne estas manĝaĵo!"

Boŭlon plengeman kial vi faris? Diru
Kiam manĝas homoj la ĉi tiajn? Diru

Aleksandro aldonis: "Ho vi reĝo, ĉu vi ŝercas kun mi? Vi jam plengemigis la boŭlojn kaj pladojn kaj volas min preni la manĝaĵon?"

La ĉina Reĝo kun ŝajniga miro diris: "Kion vi volas diri? Ĉu vi ĉi tiujn manĝaĵojn ne manĝas en via lando?"

Aleksandro ekkoleris kaj diris: "Kion vi diras? Vi troigas en ŝercado, kiu povas manĝi la gemon, mia manĝo estas du panoj se oni aldonus manĝaĵon viandan estas pli bone."

La ĉina reĝo diris alegorie: "Vi satiĝas per du-tri panoj, do, kial tiom vi invadas kaj konkeras la aliajn landojn. Ĉu tiu du-tri panoj ne pretigeblas por vi en Romo? Aleksandro, kiu ekkomprenis la alegorion de la ĉina reĝo, honteme la kapon malsuprenklinis kaj nenion diris. La reĝo daŭrigis: "Pro du-tri panoj, de ĉi tie vi iras alien? Vi atakas kun viaj trupoj landojn de aliaj, sangoverŝas, ne kompatas al maljunuloj, junuloj, infanoj, viroj kaj virinoj, nur pro tiu ĉi du tri panoj? Nun se mi ne donus al vi la panon, ĉu vi povas manĝi el tiuj ĉi oraĵoj kaj gemoj? Pro tiuj ĉi gemoj kaj oroj vi trudas la trupojn al aliaj landoj, sed vi vidas, ke ili ne estas manĝeblaj kaj por forigo de la malsato neniu de ĉi tiuj gemoj valoras!"

Oni diras, kiam Aleksandro aŭdis tiujn ĉi vortojn, nenion manĝinte forlasis Ĉinion kaj revenis al Romo.



Ŝejko Farid-od-din Attar Nejŝaburi (119-1229) estas unu el la plej grandaj mistikuloj kaj poetoj de la irana literaturo. Verkoj restantaj de li kiel "Funebra letero" superplenas de rakontoj kaj maksimoj. La supra elektita rakonto estas unu el ili, kiu elversiĝis en flua kaj simpla prozo.

F-ino M.Fahmi tradukis

Miaj instrulaboro kaj impresoj en Irano (2-a parto)

Tereza Kapista / Serbio

La morgaŭan tagon mi estis akompanata al bushaltejo kaj devus forvojaĝi al Babol-Sar, sed denove tiu irana malfruado! Mia buso ekis post 1 hora kaj 45 minuta malfruo! Nekredeble! Kial? Mi ne scias, ĉar kaj la buso kaj la ŝoforo estis en haltejo! La ŝoforoj eliradis kriante la nomojn de la urboj kien iras verŝajne tiel varbi vojaĝantojn. Tuta grupo da kursanoj akompanis min kaj tiam ni konstatis ke ni bonege povas babili dum longa tempo. Ĉe bushaltejo estas starigita longega kaj larĝa tendo en kiu oni vendadas librojn, tio estas maniero alproksimigi la librojn al publiko en lokoj kiuj estas ferenkventataj. Poste mi vidis ke tio estas kutimo en ĉiuj urboj. La lastaj rigardoj al miaj karaj gestudentoj mi ne troigas se mi diras ke vidis larmojn brili. Do, disiro elkora kaj amika!

Maŝhado ĝis revido! Afganinoj mi deziras baldaŭan kaj feliĉan reiron al via lando. Iru kaj dissemu E-ton tie! Kaj mi certas ke ili faros tion, ĉar mi sentis entuziasmon ĉe ili kun E-to. Ili vere ĝojis pro tio ke ili havis eblecon lerni kun eksterlandanino. Ili invitis min al Afganio kiam ili reiros. Ĉu mi ĝisvivos ĝis tiu tempo?

Dumvoje nia buso haltis kaj ĉiuj devis eliri por ŝlosi la buson. Ni eniris gastejĉambron aŭ kiel ili diras "ripozejon". En grandega halo estis longaj tabloj de muro ĝis muro, kun seĝoj eble pli ol 200, ĉar kelkaj busoj haltas tie samtempe. Oni povis mendi acidan lakton de ŝaflakto, panon, rizon kuiritan en lakto kun seka vinbero aŭ iun sukon ktp.!. Por mi tute nekutimaj aferoj en restoracio.

En Babol-Sar surprizo! Neniu atendis min! Mi havis telefon-numeron, sed la homoj tuj rimarkis min ke mi staras, estas eksterlandanino kaj ion atendas. Multaj demandadis min kaj deziris helpi. Vere la irananoj estas helpopretaj mi tion multfoje konstatis. Finfine trovis min f-ino Anahita Karamneĵad kun s-ro Pajam Noŭruzi kiuj veturigis min al la domo de s-ino Zahra Karimi, profesorino en kies domo mi loĝos dum 4 tagoj. Tiu domo estas vilao konstruigita de la lasta ŝaho kaj post la islama revolucio en tiuj vilaoj estis enloĝigitaj la universitataj profesoroj. Bonega solvo! Montriĝis ke mi konas la



edzon de Zahra, Golamreza sed pro tio ke en Irano la edzino ne prenas la familian nomon de la edzo mi ne tuj komprenis al kies domo mi iras. Babol-Sar estas bela urbo (ili diras eta, sed 330 000 loĝantoj laŭ mi granda) tra la centro fluas rivereto, ĉie videblas la mandarinoj jam maturiĝantaj kaj kiel etaj sunetoj brilas dense inter folioj. La rizkampoj estas nun vakaj sed videblas la trairejoj inter akvumitaj areoj ĉe Kaspia maro. Mi du-foje estis ĉe la bordo kaj havis impreson ke ĝi vere estas marego, iom severa, eble ĉar estis decembro. Mi demandis kie estas la plaĝo? La vira ĉi tie sed la virina tute aparte malantaŭ la roko iom for. Mi ne komentariis!

En Babol-Sar mi estis bonege prezentita kaj ĉie akceptita kun granda respekto. Mi estis gvidata al Gubernia Domo kie renkontiĝis la E-istoj kaj je mia miro venis la guberniestro mem saluti min kaj bonvenigi en sia urbgubernio. Ankaŭ li bonintence parolis pri nia klopodo disvastigi neŭtralan lingvon kaj dankis min pro mia alveno kaj laboro. Mi faris prelegon kun titolo "Kiel uzi E-ton." La bela salonego ne restis malplena, mi ĝojis vidi tiom da interesatoj. Post prelego regalo: kukoj, sukoj. La etoso amika kaj vigla. Oni starigis demandojn kaj mi respondadis. Mi konstatis ke Zahra havas aŭtoritaton kaj estas bona organizantino kaj kun ĉiama rideto kaptas la homojn kaj ilian intereson pri afero pri kiu agas. Krom E-to ŝi luktas ankaŭ por virinaj rajtoj. Ni iris viziti la Fakultaton, sed ne estis labortago. Ĉe enireja alto rimarkindas rubando

sed bedaŭrinde mi ne povis legi la persan tekston sed mi vidis truojn sur Ĝi. Mi ricevis la klarigon ke en la jaro1999 okazis studentaj protestoj kiam "hazarde" estis mortpafitaj flanke de policistoj kelkaj studentoj. Pro tio hodiaŭ la studentoj ne frekventas la instruadon memore al tiu tago. Simbole la truoj prezentas lokon kie trairis la kugloj! La gestudentoj promenadis en parko kaj babiladis en grupetoj sen iu ajn signo de demonstrado.

En la domo ili ĉiuj estas sen kaptukoj kaj tiam mi miregis pro nigraj, longaj, silkbrilaj hararoj de irananinoj.

Ankaŭ ĉi fakultato havas procente pli da studentinoj. Mi ankaŭ ĉeestis literaturan vesperon ĉe Fakultato. Fascina estas la lingvo kiam sonas en la formo de poezio, farsi lingvo estas milda kaj belsona. La aŭtoro legas sian poemon kaj poste la ĉeestantoj kaj profesoroj analizas ĝin. Persio iam estis tre konata pro antikvaj verkistoj kiel Ferdoŭsio, Kajjam, Rumijo, Hafezo kaj aliaj, kiuj samtempe estis ankau famaj filozofoj. Pro tio mi ne miris ke la kursanoj tuj post kelkaj studhoroj provis "verki" poemojn. Kaj la enhavo estis pri hirundo, amo kaj foresto de amato. En TV ni rigardis kiel la advokatino, aktivulo por homaj rajtoj, la unua islamanino, iranino Ŝirin Ebadi ricevis la Nobel-Pac-Premion. (Sen kaptuko kun "videblaj haroj"!!! Ja, punebla se irane!) Poste en lando okazis festaj kunvenoj omaĝe al la granda honoro kaj la virinoj defendis ŝin kontraŭ la ofendoj pro la forprenita kaptuko.

"Ŝirin naskiĝis en la jaro 1947 kaj estis inter la unuaj juĝistinoj en Tehrano. Sed post la Revolucio en 1979 ŝi devis eksiĝi de tiu posteno kaj nun laboras kiel advokatino. Ŝi estis la advokato de familioj de la pafitaj studentoj en la jaro 1999 kaj aliaj viktimoj intelektuloj dum seriaj murdoj en la jaroj 1999-2000. Ŝi estas ankaŭ granda batalanto por la Reformigo de Islamo kaj nova interpretado de islama juro kiu estas harmonio kun bazaj homaj rajtoj kiel demokratio, egaleco antaŭ la leĝo, religia libereco, libera parolado ..." . (Rimarko: La tekston mi prenis el Biografio de Ŝirin fare de Norvega Nobel-Komitato)

Eble iu povos diri, tio ne havas kunligon kun Esperanto. Sed havas ĉar inter virinoj kiuj simpatias Ŝirin estas multaj irananinoj esperantistaj. En Babol-Sar mi montris la Cseh metodon al kursanoj kun kiuj laboras d-ino Karimi. Dum 2 horoj mi montris ĉiujn gramatikajn regulojn kaj kelkajn spritaĵojn kiujn ni uzas dum niaj kursoj laŭ Cseh metodo. Diligenta helpanto de Zahra estas Pajam Noŭruzi kiu preparis la renkontiĝon. Estis plena ejo. Post "lernado" mi prezentis al ili teatraĵeton pri parolema edzino, sed la edzo kiun rolis Golamreza devis nur silenti. Mi sentis ke ili vere ĝuis la komedieton. Mi tion faris tute ne planite kiam mi eksciis ke ili ne havas teatron. Post tiu longa renkontiĝo oni regalis nin per kukoj kaj ni kune iris al la rivero kie sur ŝipo funkcias tetrinkejo. Ĉiuj estis vere gajaj kaj subite babilemaj.

Poste mi estis gastino ĉe la fratina domo de Anahita Karamneĵad. Granda familio, fratino, bofrato, kuzoj, nevoj, najbaroj, amikinoj ktp. la infanoj ĉarmaj kaj la knabo 8-jara al mia demando jesis iri kun mi al Eŭropo. Mi kantigis ilin kaj ĝis la fino de vespero ili jam povis kanti en E-to! Ili tute ne sentis sin ĝenataj de nekonata gasto kaj ni manĝegis dum 2 horoj. Hazarde mi ie diris ke mi ŝatas fiŝojn kaj en ĉiu domo mi havis fiŝojn sed ĉiam alimaniere preparitan. Irananoj ŝatas vespere longe manĝi kaj paroladi ĝis post la noktomezo, eĉ la infanoj ne iras dormi. Sed matene tro longe dormas. Tio estas verŝajne pro la varmega somero kiam nur nokte oni havas apetiton kaj estas pretaj babiladi kaj kunesti. Plaĉis al mi la tetrinkejo sur la ŝipo kie en unu parto estas separigitaj podioj kovritaj kun tapiŝoj sur kiu la gastoj sidas(sen ŝuoj) turkmaniere kaj la teo estas servata sur la tapiŝo, en alia parto sidas la viroj kaj nargilas.

Mi vizitis la studentan hejmon de la knabinoj. En unu ĉambro loĝas po 6 studentinoj. Ili invitis la amikinojn por prezenti eksterlandaninon. En la domo ili ĉiuj estas sen kaptukoj kaj tiam mi miregis pro nigraj, longaj, silkbrilaj hararoj de irananinoj. Ili starigis multajn demandojn sed ege interesiĝis pri virinaj rajtoj. Ni ankaŭ parolis pri deviga portado de ĉadoro(nigra pelerinaspekta longa tuko kiu tute envolvas la virinojn). Kun unu el ili kiu konas jam sufiĉe E-ton ili petis ke mi interparolu por ke ili aŭdu kiel sonas E-to. Ili senescepte ĉiuj lernas la anglan. Ĉiuj diris al mi ke ili studas kaj preparas sin vivi eksterlande, kaj planas ekhavi postenon kun fakultata diplomo. Mi dubas ke ili sukcesos ekhavi rajton enmigri ien ajn! Nur kiam mi eliris kaj vidis en koridoro monteton da ŝuoj tiam mi komprenis ke estis multegaj knabinoj kun mi. Oni ne rajtas ien ajn eniri kun ŝuoj. Mi taksas utila

tiun renkontiĝon, sed mi ne havas informon ĉu ili komencis lerni E-ton aŭ ne, sed ili promesis al mi. Mi estis regalita per fruktoj. La lastan vesperon Noŭruzi venis kaj donacis al mi VCD pri Irano, ilia regiono kaj siaj artaj fotoj pri floroj kaj birdoj akompanata de ege konvena muziko. Irananoj ŝatas la muzikon kaj havas belan muzikon sed nur la viroj kantas! En nigramerkato oni povas aĉeti diskojn de virinoj, sed ili estas produktitaj eksterlande kaj malpermesataj!

La 13-an de decembro mi forlasis Babol-Sar. Denove la buso malfruis ĉ. 40 minutojn. Intertempe oni kriis kelkfoje ies nomon. Ĉu eblas ke ni atendas iun malfruanton? De Zahra mi adiaŭis kiel veraj longaj amikinoj.

> Persio iam estis tre konata pro antikvaj verkistoj kiel Ferdoŭsio, Kajjam, Rumijo, Hafezo kaj aliaj, kiuj samtempe estis ankau famaj filozofoj.

La vojo ĝis Tehrano serpentis tra neĝkovritaj montoj, altaj, belegaj, kaj senarbaj. La beleco de pejzaĝo kaptis mian atenton. Post ĉiu tunelo aperis novaj, pli altaj pli belaj montoj. Kaj tiel dum 5 horoj. Mi bedaŭris ke mi ne havis kameraon filmi tion. En Terhrano min atendis bone parolanta Esperantisto. Per taksio ni iris al Irana Esperanto-Centro. Jam estas preparita la lernoĉambro, dekorita kaj ekipita per novaĉetitaj ruĝaj veluraj seĝoj. Venis ankaŭ filmisto. Sed mi iom malkontentis ĉar ne venis multaj komencantoj. Mi gvidos Cseh metodan kurson, sed kelkaj jam komencis iomete lerni. Post ili venis la dua grupo tio estas daŭriga kurso planita seminario por instruistoj, laŭ nova regulo de IEI la tiel nomata "enkonduka". Estas pli ol dek homoj. Mi uzis la libron de Spomenka Ŝtimec "Esperanto ne estas nur lingvo "ĉar tie estas prilaboritaj tekstoj kiuj rilatas kun okazaĵon en Esperantio. Poste ili respondadis al starigitaj demandoj. Ankaŭ ni prilaboris la gramatikaĵojn kiuj apartenis al unuopaj lecionoj.

Dum kelkaj noktoj mi estis gastino ĉe Nazi Solat. Ŝia domo estas agrabla iom pli eŭropeca kaj mi havis apartan ĉambron kun lito! Sed ho, ve Tehrano grandega megapoliso! Loĝas en ĝi dum-tage 13 kaj dum nokto 10 miliono da homoj, ĉar alvenadas dum tago la laboristoj kaj gelernantoj!



En la oficejo de Irana Esperanto-Asocio kun kelkaj gelernantoj

Milionoj da autmobiloj! Miloj da busoj, miloj da taksioj! Motorbicikloj sennombraj! Tri linioj de subtera trajno-metroo. Vere la metroo estas moderna, konstruis ĝin parte japanoj parte ĉinoj, la vagonoj estas japanaj. La unuaj du vagonoj estas je la dispono de virinoj!

Tamen la trafiko simple dirite estas terura kaj danĝera. Neniu trairas la straton sur la zebra irejo kaj neniu rigardas la trafiklumigilon, nek la stiristoj nek la piedirantoj. Trairi al alia flanko de la strato estas danĝera aventuro. Mi vere timis trairi kvankam en mia urbo ankaŭ estas du miliono da loĝantoj, tamen ni scias kion signifas la ruĝa lumo. Sed mirinda afero ĉar dum tuta mia restado mi ne vidis trafikiakcidenton! Sed la nesufiĉe rafinigita benzino polucias. Kiel nebulo la aero estas densa super la urbo. Oni diras ke Tehrano estas unu el la plej poluciitaj urboj en la mondo. Ĝis la loĝejo ni bezonas unu horon per taksio! Kaj mi kelkfoje vojaĝis sola.

> Hazarde mi ie diris ke mi ŝatas fiŝojn kaj en ĉiu domo mi havis fiŝojn sed ĉiam alimaniere preparitan.

La 14an de decembro venis kvar afganinoj Dijana, Akbari, Salehi kaj Saĝedi kun Vahid Partovinia. Nia denova renkontiĝo estis elkora parencsimila. Ili morgaŭ ĉeestos Zamenhofan tagon. Mi ĝojis denove vidi ilin. Du el ili dormis ankaŭ ĉe Nazi kaj ni denove longe babiladis ĉiuj kune.

Daŭrigota



Ŝuŝo, 6000-jara Urbo

Ĉefurbo de diversaj antikvaj imperioj, loĝata de popoloj kiel elamanoj, persoj, partoj kaj medoj; vidis en si famulojn kiel Darjuŝo la granda, reĝino Estera, Aleksandro la granda, kaj …

Verkis: Asad Mahbub

Ŝuŝo (48 18'E, 32 05'N), Suzo (laŭ PIV) aŭ *Ŝuŝan* (laŭ la Biblio) la antikva ĉefurbo de la imperio de Elamo, en sudokcidenta Irano, estis administracia centro kaj reĝa loĝejo de la ahemenidoj (550-330 a.K.). Ĝi estis la orienta finstacio de la Persa Reĝa Vojo, kiu kuris okcidenten al Lidio Sardiso, por ĉ. 2575 km. Ĝi trovas sin ĉ. 240 km norde de la Persa Golfo apud la bazo de la Zagros-montoj. Ŝuŝo estis unu el la plej gravaj reĝaj urboj dum la Persa Imperio.

Ŝuŝo estis la preferata loĝejo de la persa reĝo Darjuŝo (Dario laŭ PIV, aŭ Darius) I la granda (522-486 a.K.). Ĝi restis populara vintra restadejo de la reĝoj persaj ĝis longa tempo. Samkiel Frye (1976, p.107) diras:
"La grava ĉefurbo de la (persa) imperio post Darjuŝo estis la urbo Ŝuŝo, kvankam Hamedan-Ekbatano devis konservi sian antikvan prestiĝon kiel antaŭa ĉefurbo kaj ideala somer-restadejo por la kortego."

Ŝuŝo estas unu el la plej malnovaj urboj en la mondo. Elfosadoj montris tion, ke homoj estis loĝantaj ĉe la tiel nomita Akropolo en 5000 a.K. La trovitaĵoj ankaŭ pruvis la ekziston de urbaj strukturoj ĉ. 4000 a.K. Ankaŭ tio estas akceptebla ke la urbo, troviĝanta inter la riveroj Karĥeo kaj Dezo - unu el ĉi tiuj estas la antikva Eŭlaeo - estis la politika centro de Elamo jam en la kvara jarmilo a.K. La ruinaĵoj de kastelo sur kruta montosupro datiĝas je tiu ĉi periodo. Ĝi estis surkonstruita per moderna kastelo, kiu estis uzata per la francaj arkeologoj, kiuj elfosis la urbon ekde 1897 poste.

Dua parto de la urbo nun estas nomata la Reĝa Monteto kaj enhavas la ruinaĵojn de templo de Ninhursang. Tria parto de la urbo estas la Metiista Kvartalo. La asiria reĝo Aŝurbanipalo detruis la elaman ĉefurbon inter 645-640 a.K.



Bildo 1: Modelo de Ŝuŝo

Rekonstruado de Ŝuŝo

La urbo estis rekonstruita per Darjuŝo la granda. La Apadana-palaco klare estis lia preferata loĝejo. La greka esploristo Herodoto (ĉ. 480-425 a.K.) helena verkisto kaj epitetita kiel la patro de la historio, kiu multe skribis pri la ahemenida imperio, ne menciis pri alia ĉefurbo. La scenejo de la biblia libro de Estera estas Ŝuŝo, kie reĝo Ĥaŝajarŝa (Aĥaŝveroŝ aŭ Xerxes 486-465) regis. La reĝo post forigo de la edzino-reĝino, serĉante pri nova edzino, kiu iĝus la nova reĝino de la persa imperio, kolektigis plej belajn junulinojn de diversaj partoj en kastelon en Ŝuŝo, kaj post du duonjaroj – dum kiuj la junulinoj estis

plibeligantaj sin pere de respektive mirha oleo kaj poste per aromaĵoj kaj aliaj ŝmiraĵoj - Estera estis elektita.

Bedaŭrinde, granda fajro dum la regado de Ardeŝiro I, la Longbraka (Artaxerxes I Longimanus, 465-424) detruis grandan parton de la konstruaĵoj de tiu ĉi epoko. Tamen ĝi estis rekonstruita, kaj povis esti elfosita en la dudeka jarcento. Bedaŭrinde, eĉ la ruinaĵoj ne restis sendamaĝaj: ili estis parte detruitaj dum la Unua Golf-Milito.



Bildo 2: Area foto de Ŝuŝo, vidata de sudo

Sur la bildo, la Apadana-palaco estas videbla ĉe supro maldekstre. Ekzistis tri kortoj, du enirejaj pordegoj kaj unu *apadana* (spektantara halo), kies tegmento estis subtenata per 36 kolumnoj ene kaj 36 kolumnoj ekstere. Ĉi tie estis la loko de la fama okazaĵo transdirita per Herodoto:

"Kiam Darjuŝo estis reĝo de Persujo, li alvokis la grekojn kiuj okaze ĉeestis lian korton, kaj demandis de ili kion ili postulus por manĝi la mortintajn korpojn de siaj patroj. Ili respondis ke ili ne farus tion por kiu ajn mon(sum)o en la mondo. Poste, antaŭ la Grekoj, kaj tra interpretisto, tiel, ke la grekoj povis kompreni kio diriĝis, li demandis de iuj hindoj de la tribo nomata Kalatia, kiuj efektive manĝis la mortintajn korpojn de siaj gepatroj, kion ili postulus por bruligi la kadavrojn. Ili eldiris krion de hororo kaj evitigis lin mencii tian teruran aferon." [Herodotus, Histories 3,38; tradukis anglen: Aubrey de Selincourt]

Reĝo Ardeŝiro (Artaxerxes) II Mnemon (404-358) konstruis duan spektantaran halon sur la kontraŭa bordo de la rivero, kiu estas videbla sur la malsupro de la bildo maldekstre.

Rimarkinda Tabelo

Sekve de longjaraj elfosadoj, multaj antikvaĵoj jam troviĝis en Ŝuŝo. Tamen eble la plej dirivaj estas diversformaj kaj diverslingvaj tabeloj kaj skribaĵoj. I.a. rimarkinda trilingva tabelo en la palaco, nomita DSf, detale priparolas kiel Darjuŝo konstruis sian restadejon. Ĉi tie ni legas parton de ĝi:

"Granda Dio estas Ahura-Mazdo, kiu kreis ĉi tiun teron, kiu kreis foran ĉielon, kiu kreis homon, kiu kreis feliĉon por homo, kiu faris Darjuŝon reĝo, la reĝon de reĝoj, la mastron de mastroj.

Darjuŝo la Reĝo diras: Pere de la favoro de Ahura-Mazdo mi konstruis ĉi tiun palacon.

Darjuŝo la Reĝo diras: Ahura-Mazdo, la plej granda el la dioj kreis min, faris min reĝo, donacis al mi ĉi tiun regnon, granda, posedanta bonajn ĉevalojn, posedanta bonajn homojn.

Pere de la favoro de Ahura-Mazdo, mia patro Viŝtaspo (Hystaspes) kaj Arsamo (Arsames) mia avo ambaŭ estis vivantaj kiam Ahura-Mazdo faris min reĝo sur tiu ĉi tero.

Al Ahura-Mazdo tiel estis la deziro: li elektis min kiel sian homon sur la tuta tero; li faris min reĝo sur la tuta tero.

Mi adoris Ahura-Mazdon. Ahura-Mazdo portis al mi helpon. Kio estis pere de mi ordonita fari, tion Li farigis sukcesa por mi. Kion mi faris, mi faris pere de la favoro de Ahura-Mazdo.

Ĉi tiu palaco kiun mi konstruis ĉe Ŝuŝo, de malproksime ĝiaj ornamaĵoj estis alportitaj.

De miljaroj antaŭe Ŝuŝo havis evoluintan irigacian sistemon.

Malsupren la tero estis fosita, ĝis mi atingis rokon en la tero. Kiam la elfosado estis farita, tiam masonaĵoj estis plenigitaj malsupren, ĉ. 40 ulnojn funda, en alia parto 20 ulnojn funda. Sur tiu masonaĵo la palaco estis konstruita.

Kaj ke la tero estis fosita malsupren, kaj ke la masonaĵoj estis plenigita malsupren, kaj ke la sun-sekigitaj brikoj estis molditaj, la babilonaj homoj plenumis ĉi tiujn taskojn.

La cedra ligno, ĉi tio estis alportita de monto nomita Libano. La asiriaj homoj alportis ĝin al Babilono; de Babilono la karioj (Carians) kaj la jaŭnoj (Yaunâ) [=grekoj] alportis ĝin al Ŝuŝo. La yakâ-ligno estis alportita de Gandeharo kaj de Karmano.

La oro estis alportita de Lidio kaj de Baktrio, kio ĉi tie estis prilaborita. La

lazurŝtono kaj karneolo kiuj estis prilaboritaj ĉi tie, ĉi tio estis alportitaj de Sogdio. La gemo turkiso, ĉi tio estis alportita de Ĥarazmo, kio estis prilaborita ĉi tie.

La orajistoj kiuj prilaboris la oron, tiuj estis medoj kaj egiptoj. La viroj kiuj prilaboris la lignon, tiuj estis lidoj kaj egiptoj. *La viroj kiuj elfaris la bakitajn brikojn, tiuj estis babilonanoj. La viroj kiuj ornamis la murojn, tiuj estis medoj kaj egiptoj.*

Darjuŝo la Reĝo diras: "Ĉe Ŝuŝo tre bona laboro estis ordonita, tre bona laboro estis kondukita al kompletiĝo.

Min Ahura-Mazdo protektus, kaj Viŝtasp (Hystaspes) mian patron, kaj mian landon."

Ĉi tiu teksto estas tre interesa ĉar ĝi mencias nomojn de multaj diversaj nacioj. Laŭ Frye (1976, p. 108): "Ĉi tie probable ni havas la plej kosmopolitan laboristan grupon kunformiĝinta kiam ajn ĝis tiu tempo."

"Konkeru tiun urbon, kaj tiam vi ne bezonas timi defii Zeŭson pri riĉaĵoj."

Simbolo de Potenco

La palaco estis klare politika propagando, kie ĉiu vizitanto estus impresita per la grandeco de la imperio.

Post la falo de la aĥemenida imperio kaj la regado de Aleksandro la granda, Ŝuŝo fariĝis parto de la selukida imperio. Aleksandro eniris Ŝuŝon15an de decemro 331 a.K. Post tio Ŝuŝo estis nomata Selukio-sur-la-Eŭlaeo.

Palaco en greka stilo estis starigita apud la palaco de Darjuŝo. La administracia centro, tamen, estis en la suda parto de la urbo, kie preskaŭ ĉiuj grekaj kaj partaj tabeloj estis eltrovitaj.La urbo ankoraŭ estis vigla kiel komercocentro tra la partaj kaj Sasanidaj tempoj, ĝis ĝia kaptiĝo (ĉ.640 p.K) per islamaj fortoj. Ŝuŝo restis grava ĝis la dektria jarcento.

Reeltrovita en 1850, Ŝuŝo estis preskaŭ kontinue sub elfosado pere de francaj arkeologoj ekde 1897. Kvankam ekloĝigo datiĝas de neolitikaj tempoj (ĉ.4000 a.K.), la ĉefaj gravaĵoj ĉe la loko estas kvar grandaj teramasoj reprezentantaj la citadelon, la palacon de Darjuŝo I (r. 521-486 a.K.), kaj du sekciojn de la antikva urbo. Gravaj trovitaĵoj ĉe Ŝuŝo inkluzivas malnovajn pentritajn argilaĵojn kaj sigelilojn, elamajn skribojn, vastan tombejon, kaj la faman steleon de Hamurabo (1730-1685 a.K.) surportanta lian jur-kodon.

Riĉeco de Ŝuŝo

"Konkeru tiun urbon, kaj tiam vi ne bezonas timi defii Zeŭson pri riĉaĵoj." Tiel Aristagoraso de Mileto (Miletus) priskribis la enorman riĉecon de la reĝa trezorejo ĉe Ŝuŝo al Kleomeno (Cleomenes) de Sparto por peti lian helpon antaŭ la aborta ionia ribelo kontraŭ Persujo (ĉ. 490 a.K.). Cetere, li ne ekĝuis la heplon, plejprobable pro la longa vojo inter la Mediteranea marbordo kaj Ŝuŝo, kiun Kleomeno devis pasigi (Arberry, 1953, p.319).




Persa gardisto, Louvre-muzeo, Parizo



Irigaciaj Sistemoj

La irana altebenaĵo estas seka plejparte. Tial akvo ludas tre gravan kaj decidan rolon en tre diversaj terenoj: de agrikuturaj kaj ekonomiaj ĝis arkitekturaj kaj urbanizadaj (urbanismaj). Frye (1967, p. 9-10) ĉi-rilate skribis:

"Hodiaŭ sur la (irana) altebenaĵo nur en nord-okcidenta Irano, en la provinco Azarbajĝano, seka (perpluva) kultivado estas farebla, kaj tio devis esti ĉefe sama en la



Maŭzoleo de Danialo

pasinteco. En aliaj lokoj irigacio estas bezonata, kaj por konservi la karan akvon de vaporiĝo sub varmega suno, aŭ por konduki ĝin sekure tra pora tero, rimarkinda sistemo da subteraj kanaloj evoluiĝis. Irigacia kanalo – nomata *kanato* en okcidenta Irano, kaj *karizo* en orienta Irano – estas antikva en Irano, ĉar Polibius (Polybius, *Historia*, X.28) mencias ĝian multnombran ekziston en Medio."

Ankaŭ la unua ventmuelilo utiligita por irigacio estis inventita pere de babilonanoj ĉ. 1700 a.K. Eĉ nun en Ŝuŝo kaj la ĉirkaŭaĵo troveblas funkciantaj kanatoj kaj irigaciaj ventmueliloj.

Ŝuŝo en la Biblio

La Biblio menciis tri homojn rilate al Ŝuŝo :

1) Ĉe Ŝuŝo Estera elektiĝis kiel la Reĝino de Persujo (Estera 1:1-2:17) en la tagoj de Aĥaŝveroŝ t.e. Ĥaŝajarŝa I, aŭ Xerxes I (486-465)

2) Ĉe Ŝuŝo Nehemiah servis kiel pokalisto por Ardeŝir I, la Longbraka (465-424), kiam li ricevis la novaĵon pri la muroj de Jerusalemo (Neh 1:1)

3) Ĉe Ŝuŝo Danielo spertis vizion pri la venontaj invadoj per Persujo kaj Grekujo (Dan 8:2).



Restaĵoj de la reĝa palaco en Ŝuŝo kiun protektas Irana organizaĵo pri kulturaj-herdaĵoj

Fontoj:

1- R. N. Frye, *The Heritage of Persia* (La Heredaĵo de Persujo), 2a red. Londono: Sphere Books Ltd, 1976, 330 p. (1a eld. Great Britain: Weidenfeld & Nicholson Ltd, 1962)

2- R. Boucharlat, "*Susa under Achaemenid Rule*" ("Ŝuŝo sub Aĥemenida Regado") en: John Curtis (red.) *Mesopotamia and Iran in the Persian Period: Conquest and Imperialism 559-331 BC* (Mezopotamio kaj Irano en la Persa Periodo: Konkero kaj Imperiismo 559-331 a.K.) (1997 Londono) 54-67. Citita el: http://www.livius.org/su-sz/susa/susa.htm

3- A.J. Arberry (Red.), *The Legacy of Persia* (La Postrestitoj de Persujo), London: Oxford University Press, 1953 (represita en 1963 kaj 1968), 421 p.

4- www.bible-history.com/

5- www.parspage.com/history/cities.htm

6- www.archaeonia.com/


7- www.scaruffi.com/neareast.html

Naĝado de fiŝo daŭras vivon


Vort-Karikaturoj

Parviz Ŝapur (1923-), kies pseŭdonimoj estas Kami kaj Mah-doĥt, naskiĝis en Tehrano, kaj verkis multajn librojn, i.a. 3 volumojn da tio, kion en la persa li nomis *Karikalamatur*, t.e. vortaj karikaturoj.

Jene venas traduko de kelkaj liaj vortkarikaturoj elektitaj el libro titolita Hodiaŭaj Satiristoj de Irano, kio per si mem montras lian pozicion en la persa literaturo nuntempa. La libro prezentas 40 verkistojn kun fragmentoj el iliaj skribaĵoj.



Karikaturo de Parviz



Kovrilo de la libro Hodiaŭaj Satiristoj de Irano

Per maŝin-pafilo de mia koro, mi for-pelis la morton dum tuta mia vivo.
Kaĝa pordo malfermas al ĉiuj birdoj.
Mi tiom amas malplenan kaĝon, kiom ĉiujn birdojn.
Printempa burĝono vekas la arbojn el la vintra dormado.
Tapiŝfloroj plenplenas da ekzisto-floro de tapiŝistineto.
La stelo sloganas meznokte: "Morton al la mallumo!"
Naĝado de fiŝo daŭras vivon.
Ĉiu maljuna arbo povas esti juna seĝo.
Birdo, kiu nestas sur seka arbo, ĝiaj idoj eloviĝos en ĉarpentejo.
La lasta neĝo estas mortotuko de vintro.
La adiaŭvortoj de parolema homo estas aŭdindaj.
Danka floro ek-kreskas sur la tombo de ĝardenisto.
La ĝardenisto testamentis ke oni flor-brodu lian morto-tukon.
Furiozaj ondoj plugas la maron.
Ombroj de kvar rasoj estas samkoloraj.
Korpulsado de kvar rasoj samlingve kondamnas rasismon.

Fonto:
Biĵan Asadi-pur kaj Omran Salahi (Red.), *Tanz-avarane Emruze Iran* (Hodiaŭaj Satiristoj de Irano), Tehrano: Morvarid, 1986 (3-a eld.), 375 p., p. 219-227.

Elektis kaj tradukis: (s-ino) Behĝat Mamduhi

Omar Ĥajjam:

Estas vizaĝo mia kaj bulkoj sen konkuro,
***tulipoj – miaj vangoj, cipres' – mia staturo*[1]**
tamen ne klaras, kial la Dekorist' eterna
***ornamis la festhalon de l' Ter' per ĉi figuro.*[2]**

1.En la persa literaturo cipreso simbolas altecon (kiel en tiu ĉi verso) kaj liberecon. Laŭ PIV, en la okcidento ĝi simbolas funebron.
2.La Robaioj, Umar Kajjam, Trad. . Waringhien, Antverpeno: 1984 (2a eld.), 107 p: r. n-ro 79.

Je dolĉa animo...

Hosejn Alizadeh (Hamed) studis Esperanton multajn jarojn antaŭe sed pro manko de kontakto, li pensis ke la movado ne estas vigla en Irano kaj forgesis la lingvon, ĝis kiam li hazarde vizitis la budon de Irana Esperantisto en ĉijara gazetara festivalo. Li nun komencis relerni Esperanton. Krome li estas poeto en la persa. Kelkaj poemoj el lia poemaro (Be ĝane ŝirin..., Je dolĉa animo...) estas elektitaj kaj tradukitaj al Esperanto.

Komenco kaj fino
Jarkomenco:
Kajero blanka,
Jarfino:
Kajero nigra kaj malmanka.

ابتدا و انتها
ابتدای سال:
دفتری سپید
انتهای سال:
دفتری سیاه و خط خطی!

Memoroj
La drako de amaraj memoroj,
Foje
La antilopon de dolĉaj memoroj,
englutas,
Ve!

خاطرات
اژدهای خاطرات تلخ
گاه
آهوی خاطرات شیرین را
می بلعد
آه!

La mondo-bazaro
La mondo estas bazaro,
Kun nia multnombra aĉetantaro,
Atentu!
Ke ni ne vendu nin kontraŭ centon da dolaro,
Ho amik'!

بازار جهان
این جهان بازاری است
و خریدار من و تو بسیار
هشدار!
که خود را به پشیزی نفروشیم
ای یار!

Lamparo de l' koro
Nia okulo,
Estas lampo,
Nia koro,
Estas lamparo.

چلچراغ دل
چشم ما
چراغی است
دل ما
چلچراغ.

Revo
Hieraŭ:
Revo kiu forflugis,
Morgaŭ:
Revo kiu sekvos,
Hodiaŭ:
Ĉu koŝmaro inter du revoj?

رویا
دیروز: رویایی که پر زد
فردا
رویایی است در پی.
امروز آیا
کابوسی میان دو رویاست؟

Pli bela
Bonas belulino,
Sed
Poetino
Duoble pli belas!

زیباتر
زن زیبا خوب است
اما
زن شاعر
دوبرابر زیباست!

Tradukis: Kejhan Sajjadpur

Irana Kino
kaj novaj provoj

Oni kutime dividas iranajn filmojn al du kategorioj. La unua konsistas el festivalaj filmoj; t.e. filmoj arte kaj enhave altaj kiuj ricevas premiojn en internaciaj festivaloj. Sed en Irano tiuj filmoj ne allogas plimultajn ordinarajn filmrigardantojn kaj do nur havas malmulte da klientoj. Al tiu kategorio apartenas filmoj kiel "La gusto de ĉerizo" de Abbas Kiarostami, "La nigra tabulo" de Samira Maĥmalbaf, "La koloro de Dio" de Maĝid Maĝidi kaj aliaj. La dua kategorio konsistas el ordinaraj filmoj. Tiuj filmoj plaĉas al ordinara irana filmspektanto sed arte ili ne valoras alte. Plejmulto da iranaj filmoj klasifikiĝas en tiu kategorio. Verŝajne tiu divido estas iom arbitra kaj kelkaj filmoj povas aparteni al ambaŭ kategorioj kaj kelkaj al neniu.

Ŝajnas ke iranaj filmproduktistoj klopodas provi filmgenrojn jam sukcesajn eksterlande kaj serioze ne provitajn enlande por savi iranan kinindustrion.

Dum la lastaj jaroj irana kinindustrio frontis grandajn financajn problemojn.. La kialo de tiuj problemoj estas tio ke ordinaraj filmoj fariĝis tre ordinaraj kaj ties klientoj iom post iom malpliiĝas. Festivalaj filmoj ankaŭ laŭdivide estis malmultklientaj. Ŝajnas ke iranaj filmproduktistoj klopodas provi filmgenrojn jam sukcesajn eksterlande kaj serioze ne provitajn enlande por savi iranan kinindustrion. Jen kelkaj ekzemploj por tiu hipotezo:

"La brilaj noktoj" de Farzad Motamen. La filmo estas bazita sur ama novelo de Fyodor Dostoyevski. La rakonto jam trifoje filmiĝis: "Quatre nuites d'un rêveur" de Robert Breson, "Le Notti bianche" de Luchino Visconti kaj "Belyye Nochi" de Ivan Pyryev. La filmoj temas pri triangula amo. Junulino intencas viziti sian pasintjaran amaton. Li promesis reveni dum unu el kvar difinitaj noktoj al definita loko. Dume ŝi konatiĝas kun viro kaj



Sceno de "Viziti Papagon"

nova amo estiĝas inter ili. La nova amo fortiĝas pro ne reveno de unua amato dum unuaj tri noktoj. Sed fine li revenas kaj tiu nova amo estingiĝas. La irana versio similas al la aliaj sed pli-malpli bone iranigita. La kialo de konatiĝo kun la dua amato ne estas ŝia sinmortigo sed problemoj far strataj knaboj kaj saviĝo per la dua amato. La dua amato estas juna universitata profesoro pri persa literaturo kiu legas persajn poemojn dum la filmo por la junulino. La afiŝo de la filmo "Le Notti bianche" staras sur la muro de la profesora hejmo. Tio montras la respekto de la reĝisoro al siaj antaŭuloj.

Virinoj kiuj estas lacaj pro supereco de viroj speciale en evoluantaj landoj, ĝuas vidi venkon de kelkaj siaj sam-seksanoj super aliseksanoj!

"Duelo" de Ahmad Reza Darviŝ, la plej elspeziga irana kaj eĉ mezorienta filmo ĝis nun. Estas longatempe ke Holleywood faras elspezigajn filmojn kiuj ne nur repagas siajn elspezojn sed donas grandan profiton al la produktintoj. "Duelo" ankoraŭ ne surekraniĝis kaj oni atendas vidi ĉu tiu formulo ankaŭ funkcias en irana filmbazaro aŭ ne.

"Viziti Papagon" de Alireza Davudnejad

Jaro 2005 : Konkurso de infan-esegnaĵoj



Esperanto en Vendomois

Ni invitas ĉiujn instruistojn , kiuj regule aŭ foje invitis siajn gelernantojn al konkursa partopreno, denove sendi desegnaĵojn al:

Esperanto en Vendomois
Les Monts
Fr 41360 Lunay –Francio
esperantoenvendomois@free.fr

مسابقه بین‌المللی نقاشی کودکان در فرانسه

Konkursaj reguloj

Jara temo 2005 estas la 200a datreveno de la naskiĝo de dana fabelisto H.C. Andersen. La temo rilatas al tiu okazaĵo:
Elektu fabelon kaj ilustru ĝin

Formato centimentraj dimensioj : minimume 40x30

Kategorioj A : **ĝis 7 jara**
B : pli ol 7 ĝis 10 jara
C : pli ol 10 ĝis 14 jara

به مناسبت دویستمین سالگرد تولد هانس کریستین آندرسن

Limdato 25a de majo 2005
Dorse de la desegnaĵo notu, **esperantlingve,** nomon , aĝon de la infano, adreson de la lernejo aŭ de la E-klubo kaj koncizan priskribon de la verko

Premioj estos atribuitaj po 3 en ĉiu kategorio.Ĉiu infano ricevos partoprenan diplomon. Libroj, kasedoj, KD, T-ĉemizoj….. konsistigos la premiojn



Sceno de "La Brilaj Noktoj"

estas filmo pri ina gangestra bando. La edzo de unu el bandinoj kondamniĝis senkulpe al ekzekuto pro mortigo ne farita de li. La bando intencas savi lin sur la vojo inter malliberejo kaj ekzekutejo. La bando konsistas el kvar virinoj: la edzino, la amikino de la kondamnito, kaj du pagitaj fiknabinoj! La plej nova internacia prototipo de tiu filmgenro estas "Charlie's Angels" de McG, kies dua parto ankaŭ produktiĝis. Tiuj filmoj malgraŭ la ŝajna bagateleco, povas allogi kaj virinojn kaj virojn. Virinoj kiuj estas lacaj pro supereco de viroj speciale en evoluantaj landoj, ĝuas vidi venkon de kelkaj siaj samseksanoj super aliseksanoj! Aliflanke al viroj plaĉas vidi kelkajn stelulinojn kolekte en unu filmo. Por allogi pli da klientoj, produktantoj de tiuj filmoj ofte elektas malsamajn aktorinojn. Ekzemple en "Charlie's Angels" unu el aktorinoj estas Lucy Liu, orientulino inter du aliaj aktorinoj (Cameron Diaz kaj Drew Barrymore) kaj en "Viziti Papagon" ludas Mahaya Petrosian kiu estas armenino.

Ni esperas ke la novaj provoj estu sukcesaj kaj profitaj por la irana kino kiu estas en finance ne prospera situacio.

Kejhan Sajjadpur

Por pli da informoj vidu: www.imdb.com

Floroj el "La Florejo" de Sadio

Por ĉi tiu numero, kelkaj elokventaj maksimoj de Sadio estas elektitaj el la oka ĉapitro de Golestan (la Florejo) en kio la prozo kaj la poezio majstre interplektiĝis, ĉio pli bela ol la alia. La oka ĉapitro, kio estas la lasta ĉapitro de la majstroverko, titoliĝis "Pri la parol-etiketo" kaj plenas de belaj maksimoj koncizaj, utilaj por la ĉiutaga vivo. Ekde tiu ĉi numero ni aperigas ankaŭ la persanjn originalajn tekstojn por komparo kun la tradukoj instrucele.

Scienculo malpie kondutanta similas al blindulo torĉo-portanta.

Kiu vane sian vivon pasigis,
Tiu aĉetis nenion sed pagis.

عالم ناپرهیزگار کور مشعله‌دار است.

بی‌فایده هرکه عمر در باخت   چیزی نخرید و زر بینداخت

***

Tri aferoj longe ne daŭras: artiklo sen butiko, scienco sen komuniko kaj regno sen politiko.

سه چیز پایدار نماند: مال بی‌تجارت و علم بی‌بحث و ملک بی‌سیاست.

***

Du personoj estas malamikoj de l' lando kaj religio: reĝo sen pacienco kaj religiulo sen scienco.

Ne regu landon la reĝo,
Kiu Dion ne obeas.

دو کس دشمن ملک و دین‌اند: پادشاه بی‌حلم و زاهد بی‌علم

برسر ملک مباد آن ملک فرمانده   که خدا را نبود بنده فرمانبردار

***

Se vi scias novaĵon kiu ĉagrenos iun, silentu por ke alia ulo diru tiun.

Ho najtingal', raportu pri vintro-fino,
Malbonan informon lasu al gufino.

خبری داری که دلی بیازارد تو خاموش تا دیگری بیارد.

بلبلا مژده بهار بیار   خبر بد به بوم باز گذار

***

Kiu admonas obstinan personon, tiu mem bezonas ies admonon.

هرکه نصیحت خود رای می‌کند او خود به نصیحت‌گری محتاج است.

***

Ne ĉiu dum disputo lerta estas dum negoco sperta.

نه هرکه در مجادله چست در معامله درست.

***

Satano kun sinceruloj ne akordiĝas kaj sultano kun mizeruloj.

شیطان با مخلصان بر نمی‌آید و سلطان با مفلسان.

***

Se oratoro ne kritikiĝas, kiel perfektulo li ne kvalifikiĝas.
Ne fieriĝu pro via bona diro,
Laŭ via penso kaj stultula admiro.

متکلم را تا کسی عیب نگیرد سخن‌اش صلاح نپذیرد.

مشو غره بر حسن گفتار خویش   به تحسین نادان و پندار خویش

***

Kiu estante riĉa ne favoras, tiu estante malriĉa angoras.

Pli malfeliĉan ol malicul' mi ne konas,
Ĉar li ne trovas helpon kiam li bezonas.

هرکه درحال توانایی نکویی نکند در وقت ناتوانی سختی بیند

بد اخترتر ازمردم آزار نیست   که روز مصیبت کسش یار نیست

***

Kiu kun malbonuloj sidas, tiu bonecon ne vidas.

Lernos l' anĝel' akompanante diablon,
Teruron, perfidon kaj trompo-kapablon,
El maliculoj vi ne lernos honeston,
Neniam kudras vulpo ŝafpeltan veston.

هرکه با بدان نشیند نیکی نبیند.

گر نشیند فرشته‌ای با دیو   وحشت آموزد و خیانت و ریو

از بدان نیکوی نیاموزی   نکند گرگ پوستین دوزی

***

Iun oni demandis: "Al kio similas sciencisto sen praktiko?" Li respondis: "Al abelo sen mielo."

Ordonu tiun senutilan abelon:
Ne piku kiam vi ne donas mielon.

یکی را گفتند عالم بی‌عمل به چه ماند گفت به زنبور بی‌عسل.

زنبور درشت بی‌مروت را گوی   باری چوعسل نمی‌دهی نیش مزن

***

Tradukis: Kejhan Sajjadpur

Rakontetoj

Muŝo kaj reĝo

Iu viro, sidis ĉe reĝo. La reĝo estis dormema, sed kiam li fermis siajn okulojn por ekdormi, muŝo venis kaj sidis sur lia vizaĝo. La reĝo per mano forte al sia vizaĝo batis por forigi la muŝon.

Pasis tempo kaj reĝo demandis de sia akompananto: ***"ĉu vi scias kial Dio muŝon kreis?"***

La viro respondis: ***"Ne, mi ne scias, Lia moŝto diris, Eble Dio kreis ĝin por ke fortuloj sciu iam ilia forto eĉ ne estas tiom, kiom de unu muŝo".***



Viro ruza

Iun tagon viro sur vojon iris. Li vidis ŝtonon kiu falis sur la teron. Sur la ŝtono estis skribita: ***min renversigu por ke profiton vi gajnu.***

La viro ekavidis kaj kun mil penoj la ŝtonon renversigis. La viro vidis sur alia flanko de la ŝtono jena skribaĵo: ***homo avida ne sukcesos.***

La viro avida pro farita vana peno, tiom koleriĝis kaj malĝojĝis ke per alia ŝtono batis la ŝtonegon.

Subite eta ŝtono frapiĝis sur lia kapo kaj li ekfalis kaj mortis.

Elpersigis: f-ino Tahere Pandĥahi

Veziro havis ne inteligentan filon. Li sendis la filon ĉe scienculo kaj diris lin, "Eduku mian filon por ke li estu saĝa". La scienculo komencis eduki lin. longa tempo pasis sed la edukado ne efikis. Li sendis la knabon ĉe ties patro kaj diris: Li ne saĝiĝis sed malsaĝiĝis min.

Elpersigis: s-ino Mehrzad Hosejni

La Eta Princo Aliigas Iranan Arton

Verkis: (s-ro) Ahmad Reza Mamduhi

Teatra prezentado de La Eta Princo – kio siavice jam rekoniĝis kiel la libro de la jarcento – far A.A. Daŝti en la plej fama teatro de Irano, t.e. *Teatre Ŝahr* (La Urb-Teatro), emfazas la komenciĝon de nova erao por speco de ĝis-nun-nur-religia aŭ nur-irana ludstilo nomata *ŝabih-ĥani* (simil-kantado).

La Originala Versio

La Eta Princo, la ĉefverko de franca verkisto mondfama, jam rekoniĝis kiel la libro de la jarcento. Ĝi sukcesis allogi ne nur la celitajn infanajn legantojn, sed ankaŭ multege da plenkreskuloj, kiuj trovis filozofiecajn diraĵojn fajnajn en la libreto facillingva. En tiu ĉi artikolo unue tre koncize prezentiĝas la originalaj aŭtoro kaj verko, kaj poste la nova versio de ĝi en la persa poemo kaj irana teatrformo tradicia.

Liaj spertoj dum tiuj ĉi flugoj kaj liaj multnombraj akcidentoj ene de aviadiloj, kiuj ankoraŭ ne estis tiel stabilaj en tiu erao, estas bone priskribitaj en liaj verkoj Nokta Flugo (Vol de Nuit, 1931), Suda Poŝto (Courrier Sud, 1929), Milita Piloto (Pilote de Guerre, 1942), Aerarmeana Odiseado, Saĝecoj de la Sabloj, Letero al Ostaĝo (Lettre à un Otage, 1943) kaj Tero de Homoj (Terre des Hommes, 1939).

Dum lia vivado en Usono, li verkis kelkajn romanojn inter kiuj ekzistas unu el liaj plej bone konataj verkoj, La Eta Princo (Le Petit Prince). Tiu ĉi libro verkita en Nov-Jork-Urbo (1940) estas, laŭ iuj fontoj, la tria plej legata libro en la mondo dum 20-a jarcento. Sanktaj libroj de kristanoj kaj islamanoj estas la du unuaj.

Post komenco de La Dua Mondmilito, Exupéry iris reen al Francio kaj aliĝis al armeo denove. En 31-a de Julio 1944, dum unu el liaj misioj super Mediteranea Maro, lia aviadilo estis paffaligita. Nur lastatempe, en aprilo 2004, post pli ol 60 jaroj, liaj aviadileroj eltroviĝis funde de Mediteranea Maro. Nura peco, kiu certigis ke la aviadileroj vere apartenas al tiu de Exupéry, estas empen-peco, kiu surhavas etan serial-numeron 2734 L, ĝuste tiun de lia aviadilo!

La Verko

Eble, neniu historio estas pli amata per infanoj kaj plenkreskuloj kiel tiu ĉi saĝeca kaj rava fabelo.

Iun tagon, la aŭtoro rememoras, kiam lia aviadilo estis devigita surteriĝi en la Saharo, mil kilometrojn for de ĉia helpo. Li renkontas la plej eksterordinaran personon malgrandan. "Ĉu vi bonvolus," diris la nekonateto, "desegni ŝafon por mi." Kaj tiel komenciĝas la rimarkinda historio de La Eta Princo.

La Eta Princo vivis sola sur tre malgranda planedo ne pli granda ol domo. Li posedis tri vulkanetojn, du aktivajn kaj unu neaktivan. Li ankaŭ posedis floron - malsama al ĉiu floro en la tuta galaksio - de granda beleco kaj troa fiero. Estis tia fiero, ke ruinigis la serenecon de la mondo de la Eta Princo kaj komencigis al li interplanedajn vojaĝojn, kiuj kondukis lin al Tero, kie li fine lernis, de vulpo, la sekreton de kio estas vere grava en la vivo. Ekzistas malmultaj rakontoj, kiuj iu-maniere, iom-grade, ŝanĝas la mondon de siaj legantoj por ĉiam. Ĉi tiu estas unu el ili.

Jen la mistikisma fino humanisma de la verko: "Kaj nokte vi rigardos supren al la steloj. Kie mi loĝas, ĉjo estas tiel malgranda ke mi ne povas montri al vi kie mia stelo troviĝas. Ĉi tiel, estas pli bone. Mia stelo nur estos unu el la steloj, por vi, kaj sekve vi amos rigardi al ĉiuj steloj en la ĉielo... ili ĉiuj estos viaj amikoj..."

La Irana Novversio

La nova prezentado de La Eta Princo en la plej fama teatro de Irano, t.e. *Teatre Ŝahr* (La Urb-Teatro), jam komencis novan eraon por speco de ĝis-nun-nur-religia aŭ nur-irana ludstilo nomata *ŝabih-ĥani* (simil-kantado). Antaŭ tio ja okazis tre diversaj prezentadoj de La Eta Princo en Irano – i.a. okcidenteca

prezento en sama teatro kune kun ritmaj movoj, t.e. dancadoj okcidentstilaj – tamen tiu ĉi, estas iraneca iele, ĉar ĝuas tradician teatrformon de la lando.

Similkantado: kio ĝi estis ĝis nun

Similkantado ĝis nun estis arto entenanta teatron, poemon, muzikon kaj ĉefe religian temon. Larmige tristaj okazaĵoj prezentataj en similkantado plejam – se ne ĉiam - havis religian devenon. Por konatiĝi kun similkantado kaj ties historio, jene venas traduko de interreta paĝo (fonto n-ro 2). Ĉi tie nur aldonindas tio ke laŭvorte *Tazije* (funebrado) enhavas kaj induktas la religian esencon tristan kaj *ŝabih-ĥani* (similkantado) pli aludas al la teatra tekniko ĉefe kaj unue aplikita en tazijeoj. Laŭ ies kredo ĉar en Islamo estis malpermesite montri sanktulojn kaj ties vizaĝojn eĉ en pentraĵoj, oni ekuzis la vorton *ŝabih* (simila/similulo) implicante ke ili (la aktoroj) estas nur similaj al la sanktuloj, kaj ne ili mem:

"*Tazije* aŭ *ŝabih-ĥani* respektive signifas funebradon kaj similkantadon. Ĝi estas unu el la plej malnovaj kaj aŭtentikaj tradicioj de teatro en Irano. Ĝi estas speco de teatro sur bazo de ĉagrenaj vivhistorioj kaj fabeloj de la islama profeto kaj liaj parencanoj. Ĉefe, ili estas la okazaĵoj kaj kruelaĵoj, kiujn alfrontis Imamo Hosejn kaj liaj apostoloj en la Karbala-dezerto dum la Moharram-monato de 61-a heĝira jaro laŭ la islama lunkalendaro (kio egalas 680 p.K).

Kvankam sole religia teatro ĉe ĝia iniciato, tazijeo baldaŭ ampleksis aliajn formojn de folkloro, do tiel akiris amuzajn karakterizaĵojn.

Antikvaj iranaj ritoj kaj ceremonioj estas ĉe radikoj de tazijeo, specife *Sug-e-Sijavaŝ* (funebrado pri Siavaŝ, sankta teatra funebrad-rito). Sijavaŝ estis irana mitologia heroo, kies destino estis markita per tragedio kaj senhaveco. Post lia morto, magnetiza himno memorfestis Sijavaŝan tristan rakonton. La himno konservis sian gravecon ĝis la 3a heĝira jarcento (t.e. 9a jc p.K.), verŝajne de la Ale-Buje-dinastio kaj post tio. Kiel rezulto de la kresko de la ŝijaisma movado, ĝi fariĝis parto de la ŝijaista persa rito.

Dum la Safavid-dinastio (10-a jarcento), Tazijea populareco kreskis grandege ĉar ĝi akiris pli teatran formon; ĝis la fino de la Zandid-dinastio (11-a jarcento) ĝi alprenis formon proksimume al ĝia nuntempa formo.



Hodiaŭ, tazijeo ne estas nur ekspozicio de religia rakontado. Kunmetita simple, ĉiu *tazije-name* (tazije-teatraĵo), tra rima kaj instrua prezento, sendepende esprimas la diversajn religiajn mitojn de Karbalaa dektaga vojaĝado. La centraj temoj de ĉi tiuj teatraĵoj estas la konflikto inter bono kaj malbono, aŭ justo kaj maljusto, persistanta por la kredo al Ĉiela Justeco. La ĉefa partoprenanto de tazijeo preferas morton super vivo sub premado.

Tra ne-naturalisma aliro, tazijeo prezentas konatajn konceptojn kaj ideojn al sia spektantaro. Samtempe ĝi ne uzas simbolan lingvaĵon, kiu bezonus interpretadon. Dum la teknikoj de prezentado ne reprezentas ĉiutagajn vivospertojn, la ludado estas komprenebla por laikaj spektantoj helpe de la uzo de kostumoj, ornamaĵoj, akcesoraĵoj kaj dekoraĵoj.

Tazijeo, kun ĝia stranga formo de prezentado, konfirmante specon de moralo, religia kaj ideologia ordo, povas alvoki emocian reagon de la spektantaro. Ili engaĝiĝas pri framo de menso, kiu funebras Imam-Hosejnan martiriĝon. Kiel membro de la spektantaro, oni trovas intensan konekton inter si kaj la aktoroj. Estas ĉi tiu emocia kaj spirita interrilato kio estas unika en la mondo de teatro."

Similkantado de La Eta Princo

Certe La Eta Princo estas taŭga materialo por nov(ec)aj prezent-teknikoj, ĉar la verko mem jam delonge rekoniĝis kiel beletra – kaj belarta - tuŝŝtono mondskale kaj pruvis sian akceptiĝon ĉe plej diversaj popoloj. La verko, kvankam skribiĝis simple – kaj laŭŝajne por infanoj – tamen neniel malhavas noblajn kaj fundajn signifojn. Do, eble ĉar ĝi esprimis profundajn pensojn kaj ideojn simplalingvaĵe,

estas tiel vaste bonvenigita tra la tuta mondo.

Tio, cetere memorigas onin pri la robaioj de Kajjam (ĉ. 1045-ĉ. 1122), kiuj ĝuas multon similan sed certe en alia amplekso.

Poemigado de la Verko

Por tiu ĉi teatraĵo, la tuta teksto de La Eta Princo devis transformiĝi en specialan persan poemformon. La poemo, kiel masnavio* (laŭlitere duopo) ĝuas apartan rimon por ĉiu versduo. La lingvaĵo estas tre simpla kaj eble iam proksimiĝas al vulgareco. La scenej-muziko, enhavanta tradiciajn muzikstilojn iranajn, ĉiam akompanas la parolojn, kiuj senescepte estas rimohavaj poemoj. Laŭscene ĝoja aŭ malĝoja muziko elektiĝis, kio ludiĝas per triopa bando (S. Nabai, A. Salehi kaj B. Jahjai) per tradiciaj muzikiloj en Irano, kiel dramo kaj trumpeto.

La poemigadon de La Eta Princo plenumis Mohammad Motlag.

La Scenejo

La tuto de la scenejo konsistas el ĉirkaŭ 3-metr-radiusa metala rond-podio, ĉ. 1 metron alta. Ĝi estas ekipita per diversaj scenaĵoj, ekz-e la vulkanetoj, kiuj povas siatempe eliĝi el podi-subo, kie ripozas aŭ helpas al scen-ŝanĝado aktoroj momente ne rol-ludantaj. Tio fakte estas influita de tradiciaj lokoj kie prezentiĝis malnovaj tazijeoj: sube de la scenejo, en iuj lokoj, ekzistis spacoj kie la aktoroj aŭ scenejaj akcesoraĵoj povis kaŝiĝi, kaj ĝusta-momente ekaperi al la spektantoj.

La Aktoroj

En similkantado, la aktoroj fakte devas esti ankaŭ bonaj kantistoj, ĉar ĉiuj dialogoj kaj monologoj estas en poemo, kaj bezonas kantiĝi laŭte kun la muziko. La rolojn de la eta princo kaj la piloto ludas veraj similkantistoj (*ŝabih-ĥan*), t. e. Ali Agigi kaj Hasan Agigi, tamen aliajn rolojn, kiel tiujn de la astrologo, drinkemulo, sinadorulo, ktp. ludas teatraj aktoroj: Masud Heĝazi-Mehr, Junes Lotfi, Ramin Sajjar Daŝti, Hedajat Haŝemi kaj Mejsam Amir-Aslani. La nura aktorino, Homejra Mazaheri, rolas kiel la ununura floro de la eta princo. Tamen en la kantado de la poemoj ŝin akompanas vira kantisto, ĉar en la nuna Irano virinoj ne permesatas kanti sola. En la unuaj fojoj de la prezentado, viro rolis la inan floron, kiel ankaŭ tradicie okazis en similkantadoj: multam *zan-puŝ* (virine-vestito, t.e. viro) rolis virinon.

Similkantadaj Ecoj



Antoine-Marie-Roger de Saint- Exupéry 1900 - 1944

Nura formo kaj poemtono esenca de similkantado, melankoliigis al atmosferon de la teatro, malgraŭ ne tiel trista atmosfero de la orginala verko.

La reĝisoro, Ali Asgar Daŝti dum la ludado ĉiam ĉeestas apud la scenejo kaj funkcias kiel *ŝabih-gardan* (similul-kondukanto). T.e. li, kune kun M. Moradi, la scenejistino, tute videble de la spektantoj kondukas kaj hepas la ludantojn: donas al ili necesaĵojn, enordigas scenejajn dekoraĵojn siatempe, ... Li estas iniciatinto, desegninto kaj planinto de la tuta projekto. I.a. la scenejon li desegnis inspirite de la tradiciaj prezentejoj, kun teknika helpo de A.R. Bejragi.





Exupéry kun siaj frato kaj fratinoj (la 4a de maldekstre)

Pupteatraj Teknikoj

Ankaŭ speco de pupteatro estas utiligita por la prezentado de la vulpo kaj la serpento.

Aplikita tekniko – en kiu la pup-manipulanto vestas nigre eĉ la vizaĝon – estas konvena al similtantado-tekniko, kiu utiligemas ne tre kompleksajn metodojn kaŝemajn. La pupaj scenoj, konsistigas ĉefajn partojn de la dramo, ĉar eble pli profundaj dialogoj okazas inter la vulpo kaj la princeto pri la interrilatoj kaj la celo aŭ gravaĵoj de la vivo.

Interago de formo kaj enhavo

Ĝis nun oni multe parolis pri la formo kaj la enhavo de diversaj artverkoj kaj ilia interag-maniero. Preskaŭ ĉiuj kredas je ia interrilato kaj interago pri la formo kaj la enhavo, tamen pri tio ke kiu el ili du estas pli efikanta ol la alia, ne ĉiuj konsentas. Iuj forte insistas pri la valoro kaj efiko de la enhavo, kaj ne tiel gravigas pri la formo, dum aliaj akceptemas la malon. Ĉiuokaze, pro la ĉiesopinie-akceptita interago, tre grave estas kiam oni komencas apliki novan teknikon por jama verko. Alivorte, kaj aliflanke, multo nova povas okazi ekkiam oni prezentas nenovan enhavon novforme.

Aplikado de komunikilo tradicia kaj religia, kiel similkantado, por nereligiaj aŭ/kaj ekterlandaj teatraĵoj povas alporti diversajn rezultojn, jen kelkaj el ili:

Spektantoj de tazijeo kaj similkantado konatiĝas kun alispecaj literaturaĵoj ĉu enlandaj ĉu eksterlandaj.

Spektantoj de teatroj konatiĝas kun similkantado kaj tazijeo, kaj teknikoj aplikataj en ili.

Religieca atmosfero spirtuala, kohera en similkantado kaj precipe en tazijeo, plialtigas emociiĝon de la teatro.

Teatraĵoj malfacile kompreneblaj por laikoj kaj malpliaĝuloj (junuloj kaj infanoj), plifaciliĝas por tiaj spektantoj.

Eĉ ne tiel akademie spertaj teatruloj – reĝisoro, verkistoj, ludantoj, ... - povus aldoniĝi al teatr-produktantoj.

La nombro de teatr-irantoj pliiĝos sekve de ties pliampleksiĝo.

Kelkaj Citaĵo el verkoj de Antoine-Marie-Roger de Saint-Exupéry (1900 - 1944)

Se vi volas konstrui ŝipon, ne alvoku la homojn por kolekti lignon, disdividi la laboron kaj ordoni. Anstataŭ tio, instruu al ili eksopiri la vastan kaj senfinan maron.

Pri la estonteco, via tasko ne estas antaŭvidi ĝin, sed ebligi ĝin.

Rok-amaso ĉesas esti rok-amaso ĵus kiam ununura homo prikontemplas ĝin, havante interne de si la imagon de katedralo.

Amo ne konsistas el rigardi unu al la alia, sed elrigardi eksteren kune en la sama direkto.

Nur per la koro oni povas vidi ĝuste; kio estas esenca, estas nevidebla al la okulo.

Kio faras la dezerton bela estas tio, ke ie ĝi kaŝas puton.

Transportado de la poŝto, transportado de la homa voĉo, transportado de flagrantaj bildoj: en ĉi tiu jarcento, kiel en aliaj centjaroj, niaj plej altaj artoj ankoraŭ havas la solan celon de alporti homojn kunen.

Pura logiko estas la ruinigo de la spirito.

La perfekteco atingitas, ne kiam vi havas nenion plu por aldoni, sed kiam vi havas nenion plu por forpreni.

La maŝino ne izolas nin de la grandaj problemoj de naturo sed plonĝigas nin pli profunden en ilin.

Ne ekzistas espero por ĝojo krom en homaj rilatoj.

FONTOJ:

DASTI, Ali Asgar. *Ŝabih Kuĉulu* (La Eta Similulo), Proceduro de transformiĝo de La Eta Princo al Similkantado, kun la tuta teksto de la teatraĵo en la persa poemo far Mohammad Motlag. Tehrano: Enteŝarate Namajeŝ, 2004, 116 p.

www.ifvc.com/tazieh.htm

http://members.lycos.nl/tlp/

www.geocities.com/Athens/Rhodes/1916/index2.html

www.westegg.com/ Exupery/

Teatraj fotoj: (s-roj) Ali Aga-Rabi kaj Masud Pakdel

Verkis: (s-ro) Asad Mahbub

Teatraj fotoj: (s-roj) Ali Aga-Rabi kaj Masud Pakdel

IREA-Informilo N-ro 1, 2004

La nove fondita Irana Esperanto-Asocio koncize raportas pri sia agado dum la pasintaj unuaj monatoj de sia ekzisto. Ni intencas regule informi la membrojn kaj ne-membrojn pri la novaĵoj de la asocio.

En la unua monato de la nova jaro laŭ Irana kalendaro (komenciĝinta 21an de Marto 2004), nia Esperanto-movado faris gravan paŝon al pli organizita kaj strukturita agado. Cele al fondado de tutlanda asocio en Irano, ĵaude la 15an de aprilo, kunvenante en la oficejo de Irana Esperanto Centro, oni nombris la voĉojn de la membroj por elekti komitatanojn. Tiel elektiĝis 9 personoj kiel la komitatanoj.

La nova komitato komencis sian laboron elektante tri-kapan estraron el inter si. Sekve restis 6 personoj en la komitato. Jen la nomoj de la komitatanoj kaj estraranoj:

Komitato:
D-ino Ŝ. Ahmadnia
S-ro S. Borhani
F-ino N. Ebrahimpur
S-ino F. Nuri Maĝd
D-ro K. Sajjdpur
S-ro M. R. Torabi

Estraro:
Prezidanto: Inĝ AR. Mamduhi
Vic-prezidanto kaj kasisto:
Inĝ H. Shafiee
Ĝenerala Sekretario:
F-ino Simin Emrani

Elektiĝis s-ro *Aref Azari* kiel honora prezidanto de IREA.

Estis decidite ke IREA aliĝu al UEA kiel landa asocio. Tiucele eĉ la unuaj kontaktoj kun UEA jam estas faritaj. La rezulto estis esperoplena kaj motivdona.

La Statuo de IREA estas diskutita kaj jam preskaŭ preta. Nun ĝi atendas komitat-aprobon.

Estas diskutataj la proponoj pri nia laborplano. La provizora strategia plano estas preparata kaj baldaŭ la rezulto de la diskutoj anonciĝos.

Sukcesis la grup-vojaĝo de iranaj esperantistoj al Armenio por partopreni en Armena Esperanto Kongreso.

Estis grava sukceso konvinki UEA-estraron por ekspedi aktivulojn de la projekto "Zaban-e-Salam" (Lingvo de Paco) al ĉi-jara UK en Ĉinio. S-ro Said Borhani, la ĉef-motoro de la projekto en Maŝhado kaj f-ino Diana Karimi, afganino kaj iniciatoro de AFESPO akiris UEA-subtenon por vojaĝi al Pekina UK.

Ekde la 6-a de Majo 2004 ĝis la 13a de Majo, okazis en Tehrano la 11-a Festivalo de Gazetaro. Kiel pasintjare, nia revuo, Irana Esperantisto, partoprenis ĝin kaj verŝajne bone impresis la publikon. Tio estis la dua sperto tiu ĉi-terene por ni.

Raportis:

s-ro H. Ŝafii, vicprezidanto de IREA

IRANA ESPERANTISTO

"...bonŝance venis 'IRANA ESPERANTISTO", kiu diversnuance kaj riĉe proksimigas la kulturon de tiu ĉi fora lando. Jen per prezento de la materia kulturmonumento de tiu ĉi lando, granda turisma atrakciaĵo devenanta el la 10-a jarcento Bam-Citadelo, la plej granda adoba kontruaĵo en la mondo, kalkulita de UNESCO al la universala kulturheredaĵo..."
Radio Polonia, Barbara Pietrzak.

IRANA ESPERANTISTO estas internacia kultura sezon-magazino sendependa. Legante ĝin vi povas:
Konatiĝi kun plej grandaj antikvaj persaj poetoj/ mistikuloj ...
Sciiĝi pri gravaj eventoj en Irano, ekz-e en la 5a n-ro estis pli ol dek paĝoj pri Ŝirin Ebadi, NobelPacPremiitino en 2003.
Lerni pri plej allogaj vidindaj lokoj (historiaj); ĝis nun ...
IRANA ESPERANTISTO aperas ĉiu-sezone sur 56 paĝoj, ĝi estas 29cmx20.5cm, kun koloraj kovrilpaĝoj, ISSN 1728-6174.

Pliaj informoj pri la magazino, kune kun enhavtabelo de 5-a n-ro alireblas en: http://eo.wikipedia.org/wiki/Irana_Esperantisto
Jen informfontoj pri la magazino en la persa: http://www.sabzandishan/com , http://www.magiran.com/subscription.asp?mgID=2899

Interesita? Jen la Abon-informoj:
Jara abontarifo por internacia samideanaro:
Orienta Eŭropo, Azio, Afriko, Sudameriko: 15 Eŭroj.
Okcidenta Eŭropo: 20 Eŭroj.
Nordameriko, Japanio, Koreio, Oceanio: 25 Eŭroj.
Vi povas pagi la abonkotizon aŭ/kaj subtensumon al UEA, kodo: **iece-h**.



Perantoj de
IRANA ESPERANTISTO

Belgio:
FEL
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen

POLLANDO:
Stanislaw Smigielski
Ul. Krasickiego 12/6
PL-47-206 Kedzierzyn-Kozle

USONO:
Joel Brozovsky
Esperanto-Ligo por Norda Ameriko
1257 Hollis St
Emeryville CA 94608-2514, Usono
Por eventualaj legantoj en Usono: por la jaro 2004, la revuo "Irana Esperantisto" estas abonebla pere de la abonservo de ELNA (PO Box 1129, El
Cerrito CA 94530, tel +1 510 653 0998, retadreso: elna@esperanto-usa.org, ttt-ejo: http://www.esperanto-usa.org kaj iru al "Books & Other Materials" kaj poste al "Subscriptions").

Perantoj estas serĉataj en aliaj landoj!

Abonilo

Nomo: Familia Nomo: Aĝo: De kiu numero:
Ĝis kiu numero:
Adreso:

Poŝt-kodo: Telefono: E-poŝto:

Sendu la abonilon al la suba adreso (irananoj sendu kune ankaŭ kopion de pagdokumento): Sabzandiŝan Instituto, P.O.Kesto 17765-184, Tehrano, Irano.
E-poŝto: info@sabzandishan.com

Bonan legadon,

Irana Esperantisto